

Christian Richardt,

## Lulkanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Dormu, infaneto,  
en cia lul-liteto!  
Pelas for la muŝojn mi,  
ke eksonĝu dolĉ ci;  
dormu, infaneto!

En imago mia  
korpet' prosperas cia,  
el la brakoj de l' patrin'  
vidas mi elkreski cin,  
en imago mia.

Tion ne forgesu:  
Memori ci ne ĉesu  
pri l' patrina zorg' por ci;  
preĝi cin instruis ŝi.  
Tion ne forgesu!

Estu ci feliĉa!  
Sed kiel roz' dorn-riĉa  
viv' sen dornoj esta ne.  
Prenas tiujn mi, por ke  
estu ci feliĉa.

Kun ridet' vekiĝu,  
birdete ci gajiĝu!  
Mola nest' ŝirmanta cin  
estas la patrin sin';  
Kun ridet' vekiĝu!

*Traduko de la Dana poemo "Vuggevisse" de CHRISTIAN RICHARDT (\*1831-05-25 – †1892-12-18) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1987-02.*

MR-201-2 / Arg-657-1320 (2012-11-17 19:29:02)

*Mi, Manfred Retzlaff, tradukis tiun ĉi poemon en Februaro de la jaro 1987 laŭ la origina danalingva teksto.*